

Intervjuo kun s-ro Fritz Liechti la patro de la svisa Esperanto-poŝtmarko (1)

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-804/254, 1979 marto 08 kaj 10

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-36/SRI-1979-36-B-5-254-804-1979-03-10-Claude-GACOND-Intervjuo-kun-s-ro-Fritz-Liechti-la-patro-de-la-svisa-Esperanto-poshtmarko-1.mp3>

Cl.- Salutas nome de Svisa Radio Internacia Claude Gacond, kiu nun intervjuas sinjoron Fritz Liechti el Zürich rilate al la svisa poŝtmarko pri esperanto. Vi certe scias, ke la svisaj poŝtoŭicejoj eldonis poŝtmarkon pri esperanto okaze de la Universala Kongreso, kiu okazos en Lucerno. Tiu ĉi poŝtmarko havas balonon kun titolo 'Esperanto'. S-ro Liechti, kial balono 'Esperanto' sur tiu ĉi poŝtmarko?

FL.- Ni delonge serĉis propagandrimedon, kiu ne nur daŭras dum limigita tempo kiel kutime, sed dum jaroj. Do, la balono flugas kaj flugas kaj portas la grandan surskribon ESPERANTO kun la verda stelo trans la regionojn de nia lando. Ĝi estas la simbolo de plena libereco, ignoro de la limoj kaj al tio apartenas ja ankaŭ la senpena interkompreniĝo, do, la lingvo internacia ESPERANTO.

Cl.- Do, eble vi akceptos rakonti al ni iom pri la ekformiĝo de la Esperanto-poŝtmarko, ĉu ne?

FL.- Volonte. Mi devas iomete rerigardi. Kiam ni kreis la Esperanto-balonon, mi jam havis la ideon, ke ĝi estus bonega motivo por eventuala poŝtmarko, okaze de la Universala Kongreso en Lucerno. Mi submetis la ideon al la Loka Kongresa Komitato, la LKK, kaj ĝi prilaboris ĝin, ĝis kiam ĝi faris la petskribon la ĝenerala direkcio de la Svisa PTT. Tiu ĉi instanco invitis 2 personojn niaflanke por priparolo. Laŭ peto de la LKK mi ankaŭ ĉeestis. De nia flanko ni havis la ŝancon kundiskuti pri la elektota motivo. Por tiu unua kunsido mi preparis 6 proponojn, el tiuj 6 estis 5 kun la Esperanto-balono.

Cl.- Kaj la sesa estis pri Lucerno mem ?

FL.- La sesa havis la motivon de la emblemo, kiu troviĝas sur la oficiala kongresa koverto. Al la demando de la ĉefo de la kunsido, kial mi venis al la ideo de la balono por motivo sur la poŝtmarko, mi klarigis jene:

Mi opinias, ke la PTT ne emus elekti motivon jam konatan de aliaj poŝtmarkoj Esperantaj. La Esperanto-balono estas unusola en la mondo. Estas io tute nova kaj simbolas la senliman iradon trans landojn. Tio kunligas nature la kondiĉon, ke ĉie estu bona interkompreniĝo kaj por efektiviĝi tion, necesas internacia lingvo, do Esperanto. La intereso tuj estis granda kaj baldaŭ oni firme decidis, ke la Esperanto-poŝtmarko portu la bildon de la balono.

Cl.- Do, eble, niaj geaŭdantoj volus aŭdi ion pri vi mem. Ĉu vi povas al ni iom rakonti pri via profesio, via esperantistiĝo kaj eble viaj agadoj en la Esperantomovado?

FL.- Jes. Mi volonte faras tion tre koncize. En la jaro 1929 mi eklernis ĉe fervojo la profesion de elektromekanikisto. Poste mi vizitis ankoraŭ specialajn lernejojn kaj laboris kelkajn jarojn en tiu profesio. En la jaro 1935 mi eklernis la profesion de radiotelegrafisto kaj poste telegrafis en la internacia aertrafiko dum 15 jaroj. Kun la evoluo de la tekniko mi ankaŭ devis adaptiĝi kaj finfine mi fariĝis la ĉefo de la informejo por pilotoj sur la flughaveno de Zürich. Mi servis en tiu informejo al ĉiuj flugkompanioj, kiuj alflugis Zürich. 44 jarojn mi servis en tiu deĵoro kaj nun mi ĝuas la novan epokon, la pensioniĝon.

Cl.- Kaj kial, kiam vi eble alvenis al esperanto, en tiu interesa vivo ?

FL.- Esperanton mi eklernis kune kun mia edzino en la jaro 1944. En 1946 mi fariĝis prezidanto de la Svisa Esperanto-Societo.

Cl.- Do tre rapide ellernis la lingvon.

FL.- Jes, relative tre rapide, oni povas tion diri, ĉar post ses monatoj mi jam faris la ateston pri lernado kaj post dek ses monatoj mi faris la ekzamenon por la supera diplomo, kiu ja rajtigas doni kursojn. Post la akiro de la supera diplomo mi gvidis multajn kursojn. La lasta okazis en 1978 en la kadro de la Svisa Sekcio de la Eŭropa Federalista Partio, kiu enkondukas Esperanton por la internaciaj kongresoj. Depost multaj jaroj mi gvidis la superajn lecionojn en la Eŭropa Feriosemajno, organizita de la Svisaj Fervojistaj Esperantistoj.

Cl.- Do eble vi povas aludi pri tiuj Esperanto-feriosemajnoj.

FL.- La Eŭropaj Feriosemajnoj ĉiam okazis en aŭtuno kaj la fervojistoj, la svisaj esperantistaj fervojistoj klopodis aranĝi tre varian kaj instruplenan programon. Do, mi estis demandita, ĉu mi povus gvidi tielnomatajn superajn lecionojn. Mi transprenis tiun taskon kaj kreis tute personan propran metodon kunligitan kun diapozitivoj pri diversaj branĉoj por perfektigi la jam bone parolantajn esperantistojn. Kaj tiu metodo ŝajnis plaĉi al ĉiuj, ĉar oni povas diri, ke ĉiujn en tiuj lecionoj estis inter 40 kaj 50 partoprenantoj. La sukceso estis tre granda, tion montris kaj pruvis la leteroj, kiujn mi post la feriosemajnoj ricevis, kaj la homoj deziris jam por la sekvanta jaro viziti samajn aŭ similajn lecionojn.

Cl.- Do, por vi Esperanto estas vera realaĵo.

FL.- Jes, Esperanto estas por mi ne nur ludilo aŭ hobbio, sed mi vidas en ĝi: kultura realaĵo, kultura valoro estas en la tuta entrepreno ĉar nur pere de komuna lingvo, kiu havas kulturon, kiu estas flue parolebla havas la ŝancon solvi la lingvan problemon en la mondo, precipe en la internaciaj 'mitingoj'.

Cl.- Se mi ne eraras sinjoro Liechti, vi ankaŭ prezidis la svisan sekcion de KELI.

FL.- Jes, tio ĝustas. De la jaro 1951 ĝis 1976 mi estis la prezidanto de la Svisa KELI-Sekcio. KELI: Kristana Esperantista Ligo Internacia. En tiu ofico mi ekeldonis la informilon "Kristana Bulteno", kiun mi redaktis, presis kaj dissendis ĝis fine de la jaro 1972. En la internacia KELI-Estraro mi ankoraŭ estas membro. Nun vi scias kiu mi estas kaj kion mi klopodas fari por la internacia lingvo Esperanto.

Cl.- Kaj nun, kio estas via impreso kiam vi uzas poŝtmarkojn, kiujn vi helpis fari, fabriki ?

FL.- Por mi tio estas grava travivaĵo, estas preskaŭ nepriskribebla ĝojo, ĉar neniam okazis io simila en la svisa esperanto-movado. Kaj se oni scias kiel malfacile estas aperigi poŝtmarkon, ion tute oficialan de la ŝtato, oni ne povas esti sufiĉe danka por tiu evento.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond intervjuis sinjoron Fritz Liechti pri la svisa poŝtmarko pri esperanto. La venontan semajnon s-ro Fritz Liechti rakontos al ni iom pli detale pri la balono 'Esperanto', kiu troviĝas sur tiu poŝtmarko. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*